

Ora Ĵurnalo

Numero 9, Aŭgusto 2018



*Al la tuta mondo:
Bonvenon al la **verda**
Gotenburgo!*

Ullevi estas sufiĉe granda futbala ludkampo, sed kiam Gothia cup okazis 16/7 – 21/7 oni bezonis ĉirkaŭ 100 diversajn ludkampojn en kaj ekster Gotenburgo por la junulaj teamoj el la tuta mondo.

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Paĝo

2. Enhavo.
Pri Ora Ĵurnalo.
3. Espe-porko konstatas.
4. Eĥo de la somera esperantokurso 25–29 junio.
La ideo inviti polajn esperantistojn al la somera kurso venis de Sten Svenonius.
5. Kvar polaj esperantistoj renkontas la someron en Gotenburgo.
6. En la Botanika Ĝardeno.
7. PARK-RUN en Skatås.
Renkontoj kun bestoj kaj homoj.
8. Jen la Esperantoplaco por ripozo kaj interparolado – kaj kiel kontrasto la komerca centro Nordstan – por butikumado.
9. Elwira rakontis legendon pri Neptuno kaj la Ora Akvo en Gdansko.
Legendo pri la "Ora Akvo".
10. Nun (komence de aŭgusto) estas Dominika Foiro en Gdansko.
En septembro estos "Esperanto sur la strando" en Gdynia.
Aliĝilo al Esperanto sur la strando.
11. La programo de Esperanto sur la strando.
12. Elwira en Kaliningrado.
Esperanta promeno tra la olda Gotenburgo.
15. Esperanto och EU.
16. En Pärnu, Estonio, okazis la 54-an BET, 4–8 de julio 2018.
19. BET PÄRNU 2018 – (Mia parolo dum la inaŭguro).
20. Esperanto-Sabato en Gotenburgo, la 4an de aŭgusto kun 15 partoprenantoj
21. La aŭtekskurso de Bertha Benz.
Balono forflugis kun 500 kronbiletoj (50 €) de Orsa, Dalekarlio, ĝis Jönköping.
Kiu ŝi estas, la fama verkistino Astrid Lindgren?.
22. Oni povus flugi...
23. Ingegerd rerakontas el "Madicken och Junibackens Pims" de Astrid Lindgren.
24. Divenu la svedan urbon!
25. Najtingalo (*Luscinia luscinia*).
Legendo pri Najtingalo.
26. Moderna retbutiko de la Flandra Esperanto-Ligo.
27. Recepto!
El la Ĉeĥa horizonto.
20-a Esperanto-tago en Pardubice.
28. La urseto.
29. Invitoj.
30. Trovita en la esperanto-biblioteko de Stannum.
Invito al debato.
31. Mitt sjömansliv del 1 – av Roger Nilsson.

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68. La eldonfrekvenco estas monata/neregula.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com
kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com.

Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





Espe-porko konstatas

1. ke neniam ni spertis tian varmegan someron.
2. ke 21 personoj troviĝas sur la raportlisto al la studronda organizo Vuxenskolan. Temas pri "Somardagar i Göteborg Esperanto 25–29 juni 2018". El ili kvar estas el Pollando – **Elwira, Lucyna, Paulina** kaj **Janek**. Ili tre kontribuis al la trejnado en ĉiu grupo. Oni vere havis rektan profiton de la Esperantostudado. Ĉiun jaron ni bezonas nesvedparolantojn!!!! Ni esperas ke ni povos bonvenigi ilin ankaŭ por la kurso en 2019. **Sten** instruis la komencantojn, **Inga** la daŭrigantojn kaj **Andreas** la konversacian grupon. Koran dankon pro via granda kaj inspira laboro!!!!!!
3. Ĝis nun naŭ klubanoj de Gotenburgo pretas iri al "Esperanto sur la strando" en Gdansk/Gdynia. De Gotenburgo la 5an de septembro. Ree en Gotenburgo la 9an de septembro. Bv. legi la inviton sur la venonta paĝo!
4. La Gotenburga klubo deĵoros en la Libro&Biblioteka Foiro 27–30 septembro. En 2016 kaj 2017 ni ne faris tion pro diversaj kialoj – sed nun.... denove interesa afero!!!
5. Multaj arbaroj brulas en tuta Svedio. La svedaj helikopteroj ne sufiĉas por estingi la fajrojn per "akvobombado". Helpo venis de Norvegio, Italio, Germanio, Pollando kaj Francio.
6. la 4an de aŭgusto denove komenciĝis la Esperanto-Sabatoj.



Kursejo en la centro de Gotenburgo.

Vendrede ni vizitis kaj la novan Zamenhof-restoracion kaj la Lingvokafejon, kiuj ambaŭ situas apud la Esperantoplaco. Poste ni iris per la ŝipeto Älvsnabben al Klippan kaj spektis la pli-malpli strangetajn ekspoziciojn.



Ekster la kurso sep personoj iris al Vrångö, sabate, 30 septembro. Kompreneble ni volis montri al la gepoloj la arkipelagon ekster Gotenburgo.



Suna sed venta tago sur la insulo Vrångö.



Eĥo de la somera esperantokurso 25–29 junio



Ekster la kursejo en Karl Gustafsgatan, Gotenburgo. Christin plialtigis la etoson per ŝia trumpetludado. Ingegerd fotis.



La instruisto Sten Svenonius.



De maldekstre: La komencantoj Peter kaj Harriet, la progresanto Christin (antaŭe) kaj la instruistoj Inga kaj Andreas.

La ideo inviti polajn esperantistojn al la somera kurso venis de Sten Svenonius

Sur la unua bildo (en la sekva paĝo) pri la fratinoj Elwira kaj Lucyna, kiun mi ricevis printempe, ili estas en arbaro ĉe la memorŝtono kaj la juna jubilea kverko.


Se vi partoprenos en "Esperanto sur la

Strando" en Gdynia 7–9 septembro vi certe vidos la E-kverkon sur la Ŝtona Monto.

Se mi korekte legas estis skribita: JUBILEA KVERKO sur la ŝtono. Kaj plej supre estas la Esperanta stelo.



Sed la pola esperanto-kverko nur komencis sian miljaran vivon.



La jubilea esperanto-kverko en Sopot. Bildo el Vikipedio.

Se oni havas kverkon kiel ZEOŝi ĝi ne povus esti miljara kiel la sveda kverko ekster Vimmerby... ĉar esperanto estas ja sufiĉe nova fenomeno.

La plej aĝa kverko en Svedio, Kvill-eken ankaŭ nomata Rumskulla-eken kun cirkonferenco de 13 metroj nun alproksimiĝas al la "eterna ripozo". En pli ol 1000 jaroj ĝi pririgardis herbejon ekster Vimmerby, urbeto en Smolando. Verŝajne ĝi estas la sola miljara kverko en Svedio. Eble nun estas ĝia lasta somero. Nur du branĉoj havas verdajn foliojn. La foto estas el Göteborgs-Posten.



Kvar polaj esperantistoj renkontas la someron en Gotenburgo

Dumtempe pluvas en Gdansko!!!

De maldekstre: Lucyna, Elwira, Paulina kaj Janek.



Ĉar ili venis la 23an de junio mi nepre volis montri al ili la festenon de Nääs, sinjorlando 30 km for de Gotenburgo, konata pro ĝia iama seminaro pri slojdo – ligna kaj teksa. Dum la somermeztago estis teatraĵo pri kampara geedziĝo kun popoldancoj. /Siv



En la Botanika Ĝardeno



Ĉiun jaron oni sur la deklivo apud la baseno "pentras" la temon por la jaro per floroj. Jen Lucyna apud la abelo – la nuntempa simbolo por bona naturo.

Malgraŭ la longtempa sekeco la ĝardeno ŝajnis verda kaj sana.

En la parcela ĝardeneto Lucyna, Janek kaj Paulina renkontis esperantiston kaj restis tie parolante. Elwira kaj mi estis irintaj iomete for, sed kiam la aliaj ne venis, ni reiris al la parcelo. Ili estis trovintaj Victor Söderkvist, gotenburga esperantisto, kiun ni longtempe ne vidis pro liaj vojaĝoj en Eŭropo.

Eĉ se mi ne estis en distanco de aŭdeblo la pollandanoj tamen inter si parolis ne la polan, sed esperanton. Pro tio Viktor ankaŭ komencis paroli esperante kaj sekvis vigla interparolo. Ĉiuj sentis sin bone. Mirinde!



PARK-RUN en Skatås



Sabate en diversaj lokoj en Eŭropo oni aranĝas Park-run. En Gotenburgo la kurado okazas en Skatås. La partoprenantoj kuras 5 kilometrojn kaj la rezulto estas notita. Jen Janek, atendante la starton de la konkurs-kurado.



Kaj Janek kaj Paulina ŝatas sportojn. Okazis ke ili biciklis de Gråbo al la kursejo en Gotenburgo, iomete pli ol 30 kilometrojn \times 2. Parte ili povis uzi la malnovan fervojon

”Västgötabanan” – nun asfaltita por biciklistoj kaj piedirantoj – kaj ĉevaloj (por ĉevaloj sen asfalto). Tamen hejmenirante ili renkontas kontraŭdeklivojn.



Renkontoj kun bestoj kaj homoj

Bestoj: sciuro en la Botanika ĝardeno, la kato Alicia ĉe mi, erinaco en mia ĝardeno kaj novtonditaj alpakoĵoj en Graboo Ranch.

Sed homoj pli gravas, kaj viziti diversajn hejmojn iomete plenigas la bildon de la vivo en Svedio.





1. Apartamenta domo en la urbo – vizito al Aino Åberg en ŝia ĉarma hejmo kun multe da bildoj kaj aliaj artaĵoj.

2. Vicoseria domo en vilaĝo – ĉe mi.

3. Duetaĝa vilao en la arbaro proksime al la lago Stora Lövsjön – vizito al Inger Andersson en hejmo plena je slojdaĵo.



Jen la Esperantoplaco por ripozo kaj interparolado – kaj kiel kontrasto la komerca centro Nordstan – por butikumado



en la supra maldekstra angulo estas blanka kvadrato, kie la verda kvinpinta stelo prenas lokon. En la malaltaj muroj la unuaj versoj de la esperantohimno troviĝas, malantaŭ vitraj rektanguloj.

Jen kelkaj el la partoprenantoj de la esperantaj tagoj.

Post la marveturo al Vrångö, Margareta proponis promenon en Nordstan. Vera kontrasto! Ni ankaŭ vidis la plej malnovan neeklezian konstruadon en Gotenburgo, Kronhuset.

La nomo Esperantoplatsen estas malnova. Iam esperantoklubo havis lokon tie. En 2008 la placo reaĝurigiĝis. Tiam oni faris esperantan flagon sur la tero. La herbejo simbolas la verdan flagon kaj



Elwira rakontis legendon pri Neptuno kaj la Ora Akvo en Gdansko

En Gotenburgo troviĝas Pozidono – en Gdansko Neptuno, sed fakte estas la sama mara dio, sed kun greka resp. roma nomoj.

Legendo pri la "Ora Akvo"



Ĉio okazis antaŭ multaj jaroj en la urbo Gdansko, kie ĝis nun sur la ĉefa placo de la urbo staras bela fontano kun skulptaĵo de la mara reĝo Neptuno.

Ne ĉiam tiu loko aspektis tiel bele.

Komence, ĉi tie staris simpla ligna puto, ĉe kiu viroj trinkigis ĉevalojn kaj virinoj lavis vestojn. Ne aspektis tio tro bone, precipe ke ĝi troviĝis apud la plej gravaj konstruaĵoj – la urbodomo kaj kortego de Artus, kien venadis la plej gravaj gastoj, eĉ reĝoj.

Gdanska urbestro post longaj debatoj decidis lui skulptiston por ŝanĝi aspekton de la loko.

Ne plu simpla puto, sed bela fontano ekstaru ĉi tie – tiel ili decidis.

Komenciĝis la urĝa laboro, ĉar jam ĉiuj sciis, ke baldaŭ vizitos urbon la pola reĝo. La skulptistoj laboris diligente. Kiam fontano estis preta, ĉiuj alvenis por admiri la rezulton.

Gdanskanoj vidante la verkon estis vere ravigitaj kaj feliĉaj. En la sunbrilo ili povis vidi belan silueton de Neptuno. Ŝprucanta akvo de sub liaj piedoj kaj orbrilantaj agloj tiom entuziasmigis homojn, ke ili komencis ĵeti orajn monerojn al la akvon. Ĉiuj tiutage festis

ĝis malfrua nokto kaj poste lacaj profunde ekdormis, do neniu rimarkis nekutiman noktan gaston.

Nokte, venis por vidi la verkon Neptuno mem. La dio estis jam aĝa kaj lia silueto ne estis same belaspekta, tamen plaĉis al li, ke gdanskaj artistoj tiel belan lin imagas. Dankema dio faris miraklon – ŝanĝis akvon en orbrilantan vodkon kun belega aromo kaj eksterordinara gusto.

Provu imagi, kio okazis matene, kiam homoj rimarkis la miraklon – ĉiuj kuris kun bareloj, potejoj, boteloj por kapti la orplenan vodkon.


Neptuno tion observis malĝoje. Ne plaĉis al li tia avideco. La sekvontan nokton ankoraŭfoje faris miraklon kiu surprizis avidulojn – en hieraŭ plenaj da vodko bareloj, matene ili trovis simplan akvon, kaj tio kio antaŭe ŝajnis esti oro evidentiĝis simplaj malpuraĵoj. Aviduloj plendis, aliaj mokis de ili.

Poste evidentiĝis, ke nur unu modesta gastejestro, kiu prenis nur kalikon da ora akvo por gustumi ĝin, ricevis la reĝan donacon de Neptuno. En lia kelo en ĉiuj bareloj aperis la aromplena drinkaĵo kaj krom tio lian gastejon vizitis stranga kapuĉita homo kiu transdonis iun paperaĵon, kiu poste evidentiĝis sekreta recepto kiu ĝis nun permesas produkti la "Oran Akvon".

Se vi ne kredas, ke tio vere okazis – venu al Gdansko, fotiĝu ĉe la fontano kaj fortrinku kalikon da "Ora Akvo".



Nun (komence de aŭgusto) estas Dominika Foiro en Gdansko



Dum la Foiro eblas vidi la esperantan kokon.

Koko estas simbolo de la foiro kaj inter diversaj kokoj estas ankaŭ tiu verda.

Elwira sendis la foton de la esperanta koko.

En septembro estos "Esperanto sur la strando" en Gdynia



kaj tiam estos ebleco denove renkonti la agrablajn gepolojn kaj vidi la ŝipon Zamenhof, pri kiu Paulina kaj Janek faris filmeton.



Ni ankaŭ renkontos la prezidanton kaj la sekretarion de la triurba esperantoklubo Torento.

Lucyna sendis la fotojn, faritajn dum festo en la klubejo, festo por honori la ŝipon. Paulina staras meze kun la flava ŝildo.

La ŝipo M/S "ZAMENHOF"
estis nia monumento,
la tempo ĝin ne venkos,
ĉar ĝi eterne vivos en nia memoro
kaj en niaj koroj



Ĉi-jara renkontiĝo estos dediĉita al
la ŝipo kaj la „Reĝo” de Kaŝuboj

ALIĜILO
al **ESPERANTO SUR LA STRANDO**
jam la 6-a
EN SOPOT kaj GDINIO
la 7-9-an de septembro 2018

Mi aliĝas al la „ESPERANTO SUR LA STRANDO”
2018.

FAMILIA NOMO:

.....

PERSONA NOMO:

.....

Plena adreso

.....

.....

Telefono:

Retpoŝtadreso:

.....

Sendu la aliĝilon ĝis la 15-a de aŭgusto, tiam

ni garantias la plej favoran partoprenkotizon en la
egalvaloro de 30 eŭroj.

Poste vi pagos 35 eŭrojn/egalvaloron en PLN

Ĉiukaze vi rajtas pagi surloke, kiam vi alvenos!

La organizanto :

Triurba Esperantista Asocio TORENTO
81-824 Sopot, str. Armii Krajowej 94

Uzu vian komputilon pro trovi (laŭ viaj financaj
eblecoj) tranokton en Sopot aŭ Gdynia.

Ankaŭ ni servas al ĉiu aliĝonto per suflo ro pri la
ebleco tranokti.

Tiacele sendu al ni viajn demandojn al la
retpoŝtadreso:

torentosopot@wp.pl

aŭ telefonu +48 603 603 185

Pli detalajn programinformojn vi povas trovi en nia
retpaĝo

<https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/>

La 6-a ESPERANTO SUR LA STRANDO



GDYNIA - SOPOT



VENDREDO - 7.09.2018.

- 10.00 – Kial Gdynia estas eksterordinara Urbo (*Gdynia - chluba II Rzeczypospolitej*)
Solena malfermo en la Muzeo de la Urbo Gdynia - Str. Zawiszy Czarnego 1
Konatiĝo kun la muzea ekspozicio.
- 12.00 Promeno al la Ŝtona Monto kaj vizito ĉe la juna E-kverko (2009)
- 14.00 Lunĉo - Karczma Gdyńska, str. Starowiejska 54
Survoje al la Klubejo konatiĝo kun eminentaj objektoj de modernismo en Gdynia.
- 17.00 En la Centro de Neregistaraj Organizaĵoj en Gdynia - la str. 3-go Maja 27/31
Posttagmezo dediĉita al la ŝipo m/s Zamenhof kaj ĝia baptopatro - Erazm Nawrowski
- 19.30 - Distra programo - surpriza

SABATO – 8.09.2018.

- 11.00 Kolektiĝo ĉe la E-Klubejo Torento – Sopot, str. Sikorskiego
- 11.30 Partopreno en la strata parado
- 12.00 Festeno ĉe la Moleo en Sopot
- 14.00 Lunĉo
- 15.00 Rapida vizito ĉe la Jubilea Kverko
- 17.00 Vespero en la E-Klubejo Torento i/a:

Ekspozicio pri la historio de m/s Zamenhof, - aŭtoroj Paulina kaj Janusz Jaworscy
La premiera prezento de la filmo „Fluas Torento” – aŭtoro Andreo Bach
Marista bufedo – gvidos la lasta trovita maristo de la m/s Zamenhof
– la ŝipano - Jurek Jurczyński

DIMANĈO – 9.09.2018 (programo aparte mendebla)

- 10.00 – Ŝipa ekskurso tra la haveno de Gdynia
- 18.00 – Koncerto en la Arbara Operejo en Sopot

(La informo kaj aliĝilo trovebla ankaŭ ĉe <https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/>)

Elwira en Kaliningrado



Post la restado en Gotenburgo Elwira iris al Kaliningrado. Ŝi skribis:

”Julian sabaton kaj dimanĉon oni pasigis en la rusa urbo Kaliningrado, kie mi vojaĝis kun mia teatro **'Feta'**.

Oni invitis min por komune festi Tagoj de Kaliningrado. La urbo estis vere proksime, forlasinte Gdanskon, post tri horoj mi jam estis surloke.

Tamen por atingi ĝin ni bezonis rusan vizon kun foto. Vizo okupas la tutan paĝon en la pasporto. Krom tio eniron kaj eliron konfirmis stampoj kiuj forŝtelis la sekvontan paĝon en mia pasporto.

Tio estis vere eksterlanda vojaĝo!”

Do, Neptuno en teatro en Kaliningrado kaj foto de Neptuno en Gdansko en 2017 kiam SEF havis kongreson en Pollando.



Antaŭ la statuo staras kelkaj partoprenantoj el Svedio: – Roland Eriksson, Agneta Emanuelsson, Sten Svenonius, Åke Waller kaj Tatu Lehtilä.

Esperanta promeno tra la olda Gotenburgo

15 junio 2018 de Ingegerd

Ni komenciĝas je la 17 h. ĉe ”Pocket Shop” en la granda centralstacidomo. Daŭrigu al ”Femman” tra la subpasejo al ”Postgatan”



Kiu vojo estas la demando.

Kultura anonco:

"Postgatan" (Poŝtostrato) nomiĝis antaŭe "Sillgatan" (haringo strato), kaj estis la strato de ĉiuj elmigrantoj en la deknaŭa jarcento. Tiam la strato estis plena da elmigrantoj, trompistoj, prostituitoj, relistoj kaj ĉiuj aliaj homoj.

Iru rekte antaŭen tra la tuta konstruaĵo kaj eliru al "Östra Hamngatan" kaj krucigu ĝin, daŭrigu sur "Postgatan" ĝis Torggatan. Iru maldekstren al "Gustav Adolfs Torg".

Kultura anonco:

Vidu la mapon sur la grundo kiu montras la planon por la olda Gotenburgo.



Ĉirkaŭ la olda Gotenburgo.

Iru dekstren laŭ "Stora Hamnkanalen" ĝis la ponto "Tyska bron" rekte kontraŭ "Tyska Kyrkan" aŭ "Christinæ Kyrka".

Kultura anonco:

La preĝejo estis dediĉita al Kristina de ŝia patro Gustav II Adolf. Poste ŝi fariĝis reĝino Kristina. Ŝi monhelpis la germanan preĝejan komunumon en Gotenburgo.

Transpasu la ponton kaj daŭrigu laŭ "Korsgatan" preter tri domblokoj. Tiam ni troviĝas sur "Kungsgatan". Turnu dekstren. Tie ni preterpasos la Gotenburgan Katedralon "Gustavi Domkyrka".

Kultura anonco:

En la jaro 1802 "John Hall la maljuna", posedanto de Gunnebo palaco kaj unu de la plej grandaj pograndkomercistoj de Gotenburgo, mortkuŝis en la katedralturo, kiam ĝi forbrulis. Pro tio li estis la unua persono kiu kremaciĝis en Gotenburgo.

Ni daŭrigos laŭ "Kungsgatan", preterpasos "Västra Hamngatan" kaj du domblokojn, preterpasos "Ekelundsgatan", kaj daŭrigos laŭ "Kungsgatan".



La ĉevaldeklivo.

Kultura anonco:

"Hästebacken". La supra parto de "Kungsgatan nomiĝis "Hästebacken" (ĉevaldeklivo) ĉar la artilerio havis siajn ĉevalojn ĉi tie. Maldekstre situis la soldatloĝejo kiu nomiĝis "kazernon" tial la placo maldekstren nomiĝas "Kaserntorget".

Post la supro ni daŭrigos malsupren kaj preterpasos la oldan "Bastion Carolus Rex" kaj la lokon, kie "Karlsporten" situis.

Kultura anonco:

"Karlsporten" estis unu el la pordegoj de Gotenburgo. La bastiono daŭre havas la grandan montĉambron netuŝita. Ĝi povas enteni centoj da vizitantoj.

Nun ni estas alvenintaj en "Esperantoplatsen" kie Siv kaj Aino bonvenigas nin. Dekstre situas "Språkcaféet", (la lingva kafejo), kaj maldekstre estas la restoracio "Zamenhof".



En la "Lingva Kafejo" malantaŭ "Bastion Carolus Rex" apud la restoracio "Zamenhof".

Esperanto och EU

av Inga Johansson.

Jag hittade en artikel i tidskriften Publikt, från september 2003, skriven av Jan-Åke Porseryd. Först läste jag den som om den vore skriven idag, men 2003 var ju det året vi hade vår världskongress i Göteborg.

Slå vakt om det svenska språket är rubriken, men jag vill gå in på de siffror som artikeln tar upp.

EU har just nu 15 medlemsländer och elva officiella språk, men inom några år kan det vara ytterligare minst tolv språk.

Här gick jag in och googlade på EU och nu är det 28 medlemsländer och 24 officiella språk. Detta har hänt på 15 år:

Bulgariska, **danska**, **engelska**, estniska, **finska**, **franska**, **grekiska**, iriska, **italienska**, kroatiska, lettiska, litauiska, maltesiska, **nederländska**, polska, **portugisiska**, rumänska, slovakiska, slovenska, **spanska**, **svenska**, tjeckiska, **tyska** och ungerska.

De elva språk som var aktuella 2003 är markerade med fet stil, alltså har ytterligare 13 språk tillkommit på dessa 15 år.

Sedan kan man läsa:

För människorna i EU-länderna är det viktigt att ha möjlighet att uttrycka sig på sitt eget språk grundläggande krav för EUs demokratiska legitimitet.

Stora insatser för tolkning och översättning:

600–700 tolkar är dagligen sysselsatta i Bryssel, simultantolkning till och från elva språk kräver 33 tolkar. 1240 översättare, ett nittio-tal är svenskar, arbetar åt EU-



kommissionen för att översätta 1 000 000 sidor om året. (2003)

En intressant uppgift är att svenska språket då var det sextionde största språket i världen och att då studerade 50 000 studenter över hela världen svenska på akademisk nivå.

Nu vill jag gå till dagens EU och se vad esperanto skulle kunna betyda.

Jag började med att söka ordet esperanto på EUs hemsida, både på svenska och engelska och fick följande svar:

*Ingen träff. Din sökning på **esperanto** gav inga träffar med de valda kriterierna.*

*No results found. No results matching the search terms **esperanto** using the selected options.*

Då undrar man förskräckt, varför visar de denna okunnighet om esperanto, som de skulle kunna utnyttja som hjälpmedel till alla dessa tolkar och översättare, som på 15 år torde växt till otroliga siffror jämfört med 2003.

Så vad har hänt med EU sedan vi hade kongressen i Göteborg 2003?

På Vikipedio finner ni följande information på svenska:

https://sv.wikipedia.org/wiki/Europo_Demokrati_o_Esperanto

och på engelska:

<https://en.wikipedia.org/wiki/Europe%E2%80%93Democracy%E2%80%93Esperanto>

Här är en åsikt på engelska om Esperanto i EU:

Let me be clear that I'm not suggesting replacing all other languages with Esperanto, merely that it be added to the list. I want it to be the 25th language, not the only one. Esperanto is not supposed to crush or replace other languages, it was designed to be a global second language. The French will still speak French, the Slovaks will speak Slovak, the Swedes Swedish, but when they meet they could speak Esperanto. It would be better in my opinion if it was one of the main working languages, but being only one of many

languages would still be beneficial. People would be able to actually have discussions with each other instead of through a filter of a translator or someone else's native language that they are afraid are making a mistake in.

Best of all, students wouldn't have the common fear of making mistakes and embarrassing themselves in front of native speakers because both sides would be on the same level. This would be a great opportunity to bring people together and forge a common European identity.

Nu kan man hitta både positiva och negativa åsikter om EU och esperanto på nätet, så jag ber er samla in mer information till nästa nummer av vår tidning.

Inga Johansson

En Pärnu, Estonio, okazis la 54-a BET, 4–8 de julio 2018

(BET = Baltaj Esperanto-tagoj)

Kerstin Rohdin partoprenis, kaj jen ŝia raporto:

Ĉu la somero 2018 estas neordinare malfacila por vojaĝantoj en Stokholmo? Mi havis multe da maltrankvilo kaj klopodoj por trovi la trafikilojn, kiuj volis konduki min tien, kien mi bezonis vojaĝi, nome al la flughaveno por atingi BET-on. Pri la trajnoj kaj subteraj fervojoj okazis diversaj riparoj. Finfine tamen post multaj klopodoj mi trovis la flughavenon ĝustatempe. Mi flugis al Helsinko, de kie **Saliko** (oficiale **Raita Pyhälä**) kaj mi trankvile per boato vojaĝu sur la Finna Golfo al Tallinn.

En la haveno de Tallinn atendis nin **Anne Valk** kaj **Ester Pütsepp** kun biletoj por la buso, kiu gvidu nin al Pärnu. La buso tien kondukis nin tra bela verda lando. En Svedio oni kelkloke jam vidas kampojn, kiuj bruniĝas sed en Estonio ĉio verdas.

En Pärnu atendis nin **Mai Soidla**. Ŝi gvidis nin tra parko, kie grupoj prezentis belajn folklorajn dancojn en belaj kostumoj. Ŝi mendis por ni bonan ĉambron en hostelo proksime al la urbodomo, kie okazis BET. Mi



Kerstin survoje al la kunvensalono. Fotis: Saliko.



La urbo Pärnu situas en sudokcidenta Estonio apud Pärnu-golfo, kiu estas parto de la Riga-golfo, 110 km sude de la ĉefurbo Tallinn. Ĉirkaŭ 50 000 loĝantoj. (Interreta bildo)

vere gratulas kaj admiras la estonan esperantomovadon, ke ili sukcesis aranĝi BETon, ĉar nun ne estas multaj aktivuloj plu. Partoprenas 70 personoj el 11 landoj, plej multaj el la Baltiaj landoj, 5 el Svedio. BET daŭris inter 4–8 de julio. Okazis 11 prelegoj pri diversaj temoj, preskaŭ tro multaj por la mallonga BET.

Plej menciindaj estas la prelegoj de **Georgio Silber** pri originala literaturo en Esperanto, de **Perla Martinelli** pri Esperantaj verkistinoj, de **Eev Lobjakas** pri interesa kuracmetodo, de **Vjaĉeslav Hromov** pri la agado de Esperanto-Instituto de Estonio. En alia prelego li traktis diversajn religiojn. Li ankaŭ estis la prizorganto de "Somera Universitato".

Ingrid Näsholm el Svedio provis allogi novajn membrojn al la klubo de Katamantoj.

Pärnu estas nun fama renovigita urbo en "Jugend-stilo" (l'art nouveau). Ekzistas multaj belaj domoj, kun artaj pordoj kaj fenestroj. Estas granda ĝuo promeni inter ili kaj en la

belaj parkoj kaj aleoj. Ekzistas multaj festivaloj kaj artaj programoj. Ni vizitis artan orgenan festivalan programon.

Estis tuttaga ekskurso al la folkloro insulo Kihnu, kie oni prezentis malnovajn tempojn. Ankaŭ en la kadro de BET okazis vespera kantprogramo. Dankon al ĉiuj, kiuj kunstrebis, ke 54-a BET fariĝis bona kultura renkontiĝo, malgraŭ la malmultaj rimedoj. Dum la inaŭguro Kerstin Rohdin memorigis pri la densa kunlaboro inter Estonio kaj





Sur la maldekstra bildo estas komuna kantado en L. Koidula parko.

Supre: Moderna, agrabla restoracio en Pärnu. Fotoj: Saliko.

Svedio per esperanto. Vojaĝis al Estonio sesfoje dekpersonaj svedaj grupoj. Ĉiuj gajnis multon renkontiĝi kun la homoj de sia najbara lando. Sube sekvas la memorigaj vortoj pri tiuj renkontiĝoj.

Ni faris multajn promenojn inter la belaj domoj, en la belaj parkoj, kiuj abundis kaj laŭ la impona, larĝa, longa strando kun fajna sablo apud la vasta maro. Ni havis la eblecon viziti la grandan "Villa Ammende", kiu estis konstruita omaĝe al geedziĝo de bela junulino komence de la 19-a jc. La domo ekstere kaj interne estis konstruita en bela "Jugend-stilo". La domo nun servas kiel hotelo kaj restoracio kaj "kulturdomo" por koncertoj kaj teatraĵoj.

Post fino de BET-aranĝo Saliko kaj mi estis invititaj al Estona Instituto Esperanta, kiun gvidas profesoro Vjačeslav Hromov. Ni vojaĝis tre komforte per la aŭto de s-ro **Roman Ŝevtsov** al Kuressaare sur la insulo Saaremaa (Ösel). Profesoro Hromov montris kaj parolis pri sia kunlaboro kun bibliotekoj kaj politikistoj en la urbo.

Li havas kunlaborgrupon kun deko da kunlaborantoj pleje el Estonio. Li ordigis grandan artikolon en loka gazeto pri profesoro Georgo Silfer kaj Perla Martinelli, kiuj prelegis dum BET. Profesoro Hromov

faras ankoraŭ grandan laboron sur esperantokampo. Ni vizitis tre belan malnovan tombejon kaj metis florojn sur tomboj de du esperantistoj, **Karl Ojasoo** kaj **Helgi Hromova**. En la lasta tago ni faris vojaĝon per la aŭto de Roman al Tallinn. Bela vojaĝo tra verda, fekunda lando inter insuloj kunigitaj per pramoj.



Ekspozicio pri esperanto en Turenki, Finnlando.

En Finnlando ni estis invititaj al ekspozicio pri esperanto en la biblioteko de Turenki. La grupo "**Esperantoknabinoj de Tavastehus/Hämeenlinna**" preparis ĝin. Mi estis plurfoje invitita al ilia rondo kaj mi demandis ilin, ĉu ili povus fari ekspozicion pri esperantoleteroj el diversaj landoj, kiuj estis respondoj al iama anonco de la sveda verkistino **Anna Lorenz**. Ili preparis interesan



informon pri esperanto. Kolektiĝis granda grupo (dudeko da homoj), kiu interese parolis pri esperanto. La ekspozicio meritis esti montrata en aliaj urboj.

De maldekstre: Saliko (Raita Pyhälä pli oficiale), Kerstin Rohdin, Slava Hromov (Vjačeslav pli oficiale), Roman Švetsov, Boris Nikolajev.

BET PÄRNU 2018 – (Mia parolo dum la inaŭguro)

Kun granda ĝojo mi denove partopenas BET en Estonio. Lastatempe mi havis oftan kontakton kun malnovaj geamikoj en Estonio. Mi ankaŭ multon pensis pri malnovaj tempoj, kiam mi ofte vizitis Estonion kaj havis oftajn kontaktojn kun samideanoj tie. Kiel ofte okazas en la vivo, ankaŭ en Esperantio Hazardo montras la vojon. Dum pluraj jaroj en la 1990-aj jaroj mi "respondecis" pri prelegvojaĝoj en Svedio de eksterlandaj esperantoprelegantoj. Tiel mi renkontis **Ahto Kaljusaar**. Mi aŭte kondukis lin al urboj, kie li prelegu pri Estonio. Ni multe parolis en la aŭto kaj kreis bonan kunlaboran programon pri prelegvojaĝoj. **Eda-Merike Pelt** kaj **Rein Saag** inter aliaj ĉirkaŭvojaĝis en suda Svedio, rakontis pri Estonio kaj kantis folklorajn estonajn kantojn. Tio estis bona rekonatiĝo kun lando, kiu dum periodo estis fremda al ni.

En la komenco mi kune kun **Birgitta Ekvall** estis invitita de Ahto Kaljusaar al Tallinn. Mi memoras, ke ni venis iun grizan, pluvan, printempan tagon. Li renkontis nin ĉe la ŝipo de Stockholm kune kun pluraj esperantistoj kun floroj enmane. Estis gaja, feliĉa etoso. Mi memoras, ke mia patro rakontis, ke tio sama

okazis al li, kiam li partopenis postkongresan vojaĝon al Tallinn post UK 1934 en Stockholm. La rakontoj de mia patro estis miaj unuaj kontaktoj kun Estonio.

Kiam Birgitta kaj mi venis al Tallinn, ni estis invititaj al la fama kluba renkontejo. Ni renkontis tie ankaŭ **Jaan Ojalo** kaj parolis kune pri daŭrigaj kontaktoj inter Estonio kaj Svedio pere de esperanto.

Kiam mi revenis hejmen mi ankaŭ provis aranĝi etajn grupvojaĝojn de svedoj al Estonio, ĉar estis tiatempe granda intereso pri tio, kio okazis en Estonio. Mi estis tiel bonŝanca, ke mi povis aranĝi ses vojaĝetojn kun dek personoj en ĉiu grupo. Duono estis esperantoparolantoj – duono ne. Ni loĝis du personoj kune en ĉiu estona hejmo. La esperantisto interpretis, tiel ke ĉiuj povis paroli inter si. Mi aŭdis plurajn el la vojaĝantoj diri ke tiaspeca vojaĝo estis la plej interesa kiun ili partopenis, ĉar oni renkontis "homojn". Ni pagis sumon por la loĝado, pri kio ni "gvidantoj" interkonsentis. Estis vere renkontiĝo inter grupoj, kiuj dum jardekoj vivis en "malsamaj mondoj". Multaj amikiĝis por la resto de la vivo.



En 2019 la BET okazos en Panevėžys en Litovio.

La pinto de niaj vojaĝaranĝoj estis, ke grupo de dek estonaj esperantistoj partoprenis SEF-kongreson en Oskarshamn, la plej interkultura kongreso de SEF en tiu tempo. Artaj ekspozicioj kun artistoj de Estonio (Pärnu), Svedio, Anglio. Teatraĵo verkita de **Harold Brown** kaj prezentita de **Jerzy Fornal** el Pollando, unua prezentado de **Ĵomart kaj Nataŝa** en Svedio, prelegoj de Harold Brown pri esperantokulturo kaj de **Erich Dieter Krause** pri lia nova vortaro. Pluraj artikoloj en gazetoj, en radio, mimprogramo en infanvartejo fare de Jerzy Fornal. Mi bone memoras la gajan feliĉan etoson. La estonoj loĝis ĉe svedaj esperantistoj dum dek tagoj, ĉar nia "postkongresa vojaĝo" okazis en Öland kaj Småland, kie ni vizitis inter alie Vimmerby, la urbon de Astrid Lindgren. Mi memoras la feliĉan, la esperoplenan tempon, la unuajn paŝojn de la nova Estonio. Mi plurfoje vizitis Estonion kaj ricevis multajn bonajn geamikojn kaj iom lernis koni la naskiĝon de la nova lando.

Dankon al vi ĉiuj, kiuj akceptis nin!

Dankon por ĉio, kion vi instruis al ni kaj helpis al ni!

Dankon ankaŭ al vi kiuj helpis al mi aranĝi tiun ĉi vojaĝon! Ankaŭ al Saliko, kiu trovis bonan horaron inter Helsinki kaj Tallinn.

Dankon al ĉiuj miaj geamikoj en Esperantio!

Specialan dankon al Helju Viires kaj Hilja Sarapuu, kiuj ambaŭ multon helpis dum nia interŝanĝa kunlaboro!

Dankon al miaj geamikoj Vjaĉeslav Hromov, Virve Ernits, Mai Soidla kaj Anne Valk, kiuj helpis al ni pri la nuna vizito!

Dankon ke vi ankoraŭfoje aranĝas BET en Estonio!

Dankon al vi ĉiuj!

Estu sukcesa BET!

Post alia agrabla surakva revojaĝo al Helsinki estis tempo reflugi al Stockholm. Laca vojaĝanto alteriĝis en Arlanda, sed mi sentis ke mi trapasis "tempomaŝinon", ĉar mi vidis grandan betularbaron tute flava kaj imagis, ke jam estas oktobro.

Interesajn kortuŝajn esperantosemajnojn mi travivis kun malnovaj kaj novaj geamikoj.

Kerstin Rohdin




Esperanto-Sabato en Gotenburgo, la 4an de aŭgusto kun 15 partoprenantoj

El Stokholmo venis Soile Lingman. Ankaŭ ŝi partoprenis en BET, Estonio, kaj rakontis pri siaj impresoj.

Ŝi plurajn fojojn vizitis BET, sed Estonio estas ŝia plej ŝatata lando. Finnlandano (origine) ja sentas sin hejme en lando, kie oni parolas lingvon, kiu tre similas al ŝia gepatra.

La aŭtekskurso de Bertha Benz

de Göteborgs-Posten 9 junio 2018



Frumatene dum la aŭtuno 1886 Bertha Benz, edzino de la motorpioniro Carl Benz, ellitiĝis kaj ŝtelkaŝiris al la novkonstruita aŭto Patent motorwagen nr 3.

Carl dubis ĉu lia memkonstruita aŭto vere taŭgis por veturoj. Bertha volis prui ke ĝi

estas uzebla. La du adoleskantaj filoj helpis ŝin. Ili kune rulis la aŭton ekster distanco de aŭdeblo de Carl kaj startis la motoron. La veturo komenciĝis en Mannheim kaj la celo estis Pforzheim, kie loĝis la patrino de Bertha. La distanco estas 100 km. Kun maksimuma rapideco de 15 km/h la veturo daŭris preskaŭ la tutan tagon. Benzinstacioj ne troviĝis kaj la triopo devis halti ĉe apotekoj por aĉeti benzinon en malgrandaj boteloj.

Ĉi tiu evento estas rigardata la unua aŭtekskurso.

El Göteborgs-Posten 12 junio, 2018

Balono forflugis kun 500 kronbiletoj (50 €) de Orsa, Dalekarlio, ĝis Jönköping

Ĝi estis trovita de virino en akvokavo apud benzinstacio en Jönköping rekta distanco 373 km for de Orsa. La sveda por "rekta distanco" estas "fågelvägen" – la birda vojo... sed eble nun ankaŭ "ballongvägen" – la balona vojo. Per aŭto la distanco estas 434 km. Entute la pakaĵo enhavis 3 500 kronojn (350 €). La virino pensis ke povus esti mono de narkotaĵoj kaj



